40
Birštonas, Litovio
BET

# Meandro 4

## Ĉiutaga informilo de BET- 40 en Birštonas

* Mardo * 2004.07.13

**HODIAŬ**

### Marde, la 13an de julio

**07:00-08:00** Jogo (por dezirantoj, en la sportista komunloĝejo)
**08:00-09:00** MATENMANĜO
**09:00-10:00** Konatiĝo kun litova lingvo (Petras Čeliauskas, en 204)
**09:00-12:45** Diplomiga seminario de ILEI (salono de urba magistrato)
**09:30-11:00** Paroligaj kaj perfektigaj kursoj (E. Bondar en 200, S.Trenner en 305, Nina Pietuchowska en 306)
**10:30-11:30** Renkontiĝo kun legantoj de LITOVA STELO, abonado de la revuo (en 204)
**11:00-12:00** BEF: Prelego de Aleksaner Korĵenkov pri "Fjodor Dostojevskij en Esperanto" (salono de magistrato)
**12:00-13:00** BEF: Diskutrondo pri la Esperanta gazetaro (salono de urba magistrato)
**11:00-11:30** Ekumena diservo, gvidas pastoro E. Laiconas (en 305)
**11:45-12:45** Prelego de T.Grundstrom "Infana literaturo en Esperanto" (en 204)
**13:00-14:00** TAGMANĜO
**14:00-15:00** Prelego de M.Želve "Rudolfs Libeks – aŭtoro de la unua Esperanto-libro por latvoj" (en 204)
**15:30-16:30** Prelego de J.Halasz "Mia patrujo – Hungario" (en 204)
**17:00-18:00** Videofilmo "Kaunas – urbo ĉe riverkunfluo" (en 204)
**18:00-19:00** VESPERMANĜO
**19:00-20:00** Instruado de kantoj (V.Čojienė, en 204)
**20:00-21:00** Ĵaza vespero (en kulturcentro)
**21:00-22:00** Distra vespero (en salono de apuda domo)

### ŜANĜOJ en la programo:

En la libreto anoncitaj prelegoj pri medicino de A.Maruška je la 11:45 marde kaj ĵaŭde ne okazos. Anstataŭ ili vendrede je la 11:30 por medicinistoj okazos ekskurso tra la sanatorioj VERSMĖ kaj TULPĖ. Lasta prelego pri metodiko Su Ĝok okazos ankaŭ vendrede je la 14:00 (tuj post la tagmanĝo)


### Ekskursoj per la ŝipo

Morgaŭ tuj post matenmanĝo iru al direkto de preĝejo kaj plu al riverbrdo, kie vin atendos la ŝipo. NE forgesu preni ombrelojn.

### Restis nur 10 biletoj por ŝipa ekskurso

Se vi ankoraŭ ne decidis, ĉu partopreni en la ekskurso aŭ ne, do ne prokrastu tion: aĉetu bileton hodiaŭ, ĉar morgaŭ jam povas esti malfrue. La biletoj aĉeteblaj en libroservo. Ĝis revido sur ferdeko de la ŝipo!

*MORGAŬ, LA 14AN DE JULIO, "MEANDRO" NE APEROS.*



# HIERAŬ SUR FOTOJ



▲ Koncerto de la teatra infana studio "Nenuorama" (Petolulo).




▲ Paroliga kurso. Gvidas S.Trenner.



▲ Konatiĝo kun litova lingvo. Prelegas P.Čeliauskas.




▲ Su Ĝok metodiko. Prelegas Afredas Maruška.



▲ Distra vespero, finfine kun muziko.

## "LITOVA STELO" POR VI




Jam dek-kvinan jaron sur Esperanta firmamento denove lumas nia revuo – renaskiĝinta "Litova Stelo". Aperas 6 numeroj jare, ĉiu po 32 paĝoj plus koloraj kovriloj. Ĉiuj tekstoj estas en simpla Esperanto kaj ne nur pri Litovio. Ĉi tie vi trovos diverstemajn artikolojn, inkluzive esperantologiajn, originalan kaj tradukitan beletron, distrajn paĝojn k.s.

Estas grave, ke tiuj esperantistoj, kiuj ja intencas partopreni en la 90a Universala Kongreso venontjare en Vilnius, nepre abonu "Litovan Stelon", ĉar sur ĝiaj paĝoj ili povos pli detale konatiĝi kun la kongreslando, kun vizitindaj lokoj kaj objektoj.

Ankaŭ vi mem povas kunlabori sendante materialon; ni volonte publikigos artikolojn pri via lando, pri Esperanto-movado kaj pri aliaj temoj.

Hodiaŭ je la 10:30 en salono 204 okazos renkontiĝo kun legantoj kaj legontoj de "Litova Stelo". Mi rakontos historion de la revuo.

Estos ebleco aboni la revuon por la jaroj 2004 kaj 2005. Jara abonprezo estas 14 eŭroj aŭ 48 lidoj (por ekssocialismaj landoj 10 eŭroj aŭ 35 lidoj). Novaj abonintoj por la jaro 2004 tuj ricevos la unuajn tri numerojn, aliaj venos perpoŝte.

Mi atendas vin!

Petras Čeliauskas, redaktoro de "Litova Stelo"

## ĴAZA VESPERO

Marde en urba kulturcentro je la 20a horo prezentiĝos Diksilendo el Alytus. Gvidanto D.Plukas. La enirbileto kostas 5 lidojn. Kiuj venos pli frue, tiuj ricevos lokojn ĉe la tabloj kaj povos mendi vinon.

## RENKONTIĜIS MEDICINISTOJ

Hieraŭ okazis renkontiĝo de medicinistoj. Partoprenis 16 personoj. D-ro A.Maruška rakontis pri esperantista medicinista agado en Litova E-Asocio, en UEA kaj pri diversaj senmedikamentaj metodoj. Samtage li gvidis unuan ekspres-kurseton pri Su Ĝok terapio. La dua okazos vendrede je la 14:00.

## LIBROSERVO

Malantaŭ la registrejo troviĝas libroservo. Ĝi funkcias je 09:00-12:00 kaj 14:00-17:00. Tie aĉeteblas ne nur libroj, sed ankaŭ la videofilmo "Litova kalendaro" kaj aliaj. Bonvenon!



## NI ATENDAS VIAJN IMPRESOJN

Ĝis kiam viaj impresoj ne forvaporiĝis, fiksu ilin sur papero. Estas interese, kiel al vi plaĉis la ekskurso al Rumšiškės, do kaptu vespere liberan minuton, skribu kaj transdonu al redaktoroj de MEANDRO. Plej interesajn skribaĵojn (aŭ fragmentojn) ni volonte publikigos kaj iliaj aŭtoroj ricevos donaceton.

Ni atendas viajn impresojn ankaŭ pri la tuta BET ĝenerale; ili povas esti publikigitaj ankaŭ sur paĝoj de LITOVA STELO.

## KELKAJ LITOVAJ PROVERBOJ

Oni donas – danke prenu, oni batas – fuĝi penu.
Ploras pano ĉe pigrulo en mano.
Ridas tago pri nokta ago.
Al feliĉo kaj gloro kondukas laboro.
Por morgaŭ panon ŝparu, laboron tuje faru.
Fremda fumo ŝajnas parfumo.
Ne ĝoju laŭdata, ne ploru insultata.
Al drinkulo eĉ la maro ŝajnas travadebla baro.
Eĉ koko fortas en sia korto.
Kiu ploras petante, ploros ankaŭ redonante.

## DIVENU LITOVAJN ENIGMOJN

Eta karna peceto, ĝi homon pendigas kaj liberigas.
Pli granda ol ĉevalo, pli malgranda ol hundo.
Kvar fratetoj sub unu ĉapeleto.
Kunkudrita, sed ne vesto, kun folioj, sed ne arbo.
Sen hakilo hakileto, sen ĉizilo ĉizileto ĝi konstruas pontojn.
Blanka herbejo, nigraj ŝafetoj, kiu scipovas – tiu ilin paŝtas.
Kiu matene iradas kvarpiede, tage – dupiede, vespere – tripiede.
Du fratetoj, sed pro monteto ne vidas unu la alian.

## RIDETU

Malgranda Joĉjo kun intereso legas libron pri astronomio.

- Avĉjo, - diras li, - ĉi tie oni skribas, ke post biliono da jaroj nia mondo ne plu ekzistos!
- Kiam?
- Post biliono da jaroj.
- Hu! – kun plifaciligo suspiras la avo. – Kaj mi ekaŭdis, ke vi diris "post miliono".
- Karulo, mi ege bezonas novan pelton por la vintro.
- Tio ne eblas!
- Se mi ne havos pelton, mi malvarmumos, ekmalsanos je pneŭmonio kaj mortos. Kaj sepultado hodiaŭ kostas multe pli ol pelto.
- Jes, sed tiu elspezo estas nur unufoja.

Edzo riproĉas edzinon, kiu aĉetis tre multekostan robon.

- Sed karulo, - diras ŝi mirinte, - ni ja estas riĉaj. Mi vidis vian ĉeklibreton: vihavas en banko 8885650 lidojn!
- Lidojn?!! Ja tio estas numero de mia konto en la banko!




*Ĉu vi volas aliĝi? **Eblas tion do fari dum BET Turniĝu al la registrejo.***

## FERVOJISTOJ ESTAS SERĈATAJ!

Estimataj Gesamideanoj!

Membroj de nia vojaĝgrupo estas fervojistoj. Ni agadas en la Fervojista Esperanto-Societo en urbo Miskolc. La fervojistoj havas tradician internacian organizaĵon, kies nomo estas Internacia Fervojista Esperanto-Federacio (IFEF).

IFEF estas unu el la plej malnovaj fakaj organizaĵoj, kunlaborantaj kun UEA. Enkadre de UK okazas fervojista kontaktkunveno. Venontjare UK estos aranĝita en Vilnius kaj estus grave trovi kolegojn el Litovio, kiuj povus helpi organizi la programon de la fervojista kontaktkunveno. Por ni estas tre grave trovi kontaktojn kun fervojistaj esperanatistoj ie ajn sur nia planedo. Mi petas, se inter la partoprenantoj de BET-40 estas fervojistoj, aŭ kiuj povas helpi al mi trovi kontaktojn kun fervojistaj esperaantistoj (ne nur en Litovio, sed ie ajn), do ili bonvolu serĉi min dum la tempodaŭro de BET-40.

Anticipa danko pro via helpo – Jozefo.

Ke nia informilo ***MEANDRO*** estu pli interesa, tio dependas ankaŭ de vi! Skribu viajn impresojn, proponojn, kritikojn, ankaŭ anoncojn pri viaj programeroj. Mallongajn artikoletojn transdonu al la redaktoroj aŭ restigu en registrejo. Pli longajn artikolojn pri la aranĝo skribu por ***LITOVA STELO***.



Redaktoroj: Petras ČELIAUSKAS, CHOE Taesok